„Kial vi ofertas seksan servon ĉi tie?“, demandis Don kaj alrigardis Tidon, kiu respondis: „Estas pro la mono, nur pro la mono. Por viroj vere estas problemoj, gajni ion. Per normala laboro mi gajnas nur malmulton. Krome mi neniam direkte ricevas la monon. Ĝi estas unue ĝirata al mia edzino. Ŝi tiam donas al mi trionon. Triono estas pro la reĝinaj impostoj, kaj triono estas por ŝi. La lastajn jarojn mi spertis multe da kvereloj, ĉar mi perlaboras nur malmultan monon. Ŝi preskaŭ devigis min labori ĉi tie. Estas feliĉo, ke mi nur laboras por ses horoj. Hejme mi ja krome devas mastrumi, tiu laboro en la propra hejmo kompreneble ne produktas monon“. Birte komplete demandis: „Vi ŝajne ja tute ne estas kontenta kun via edzino. Kial vi ne simple forlasus ŝin? Vi estas ja belaspekta viro kaj certe facile trovus pli bonan virinon“. Tido laŭte ridis: „Vi komprenas tute nenion! Sur Umlaba nur la virino rajtas forpuŝi edzon kaj postuli divorcon. Por viroj tio ne estas permesata. Kaj la vivo sen edzino estas eĉ pli malfacila. Se sendependa viro laboras, li ricevas nur kvaronon de la salajro, la resto malaperas pro la impostoj.“

Birte kaj Don lernis, ke viroj sur Umlaba vere travivas pezajn vivkondiĉojn. Ankaŭ Zane plendis: „Eĉ se mi, kiel sendependa viro, serĉus nur tre malaltan laboron, mi devas unue kontentigi la direktorinon de la laborloko. Mi mem spertis, ke ŝi postulis de mi seksan servon antaŭ la komenco de la laboro aŭ poste dum libertempo. Se mi rifuzus tion, ŝi senpere maldungus min. Se mi estas edziĝinta, mi estas iomete protektita per mia edzino. Ŝi devas ja konsenti al mia kontrakto. Do, tiam la direktorino konas ŝin, kaj tial ne riskus sekse ekspluati ŝian edzon“. Birte kaj Don dankis pro la detalaj informoj kaj adiaŭis.

„Ni iru nun al la renkontejo antaŭ la magazeno“, diris Don. Tie alveninte, restis ankoraŭ kelka tempo por trairi la butikuman konstruaĵon. Ŝajne ne estis granda diferenco inter la aranĝoj de la vendejoj inter Umlaba kaj Tero. Nur unu butikoj malmalmergiĝis, estis vendejo por ludmaterialo. Ĉi tie troviĝis du sekcioj, unu por knabinoj, markita per blua koloro, kaj la alia por knaboj, markita per roza koloro. Do, tute kontraŭe por teranoj. En la sekcio por knaboj estis ofertitaj pupoj, pupoĉaroj, dometoj por pupoj k.t.p. En la sekcio por knabinoj montriĝis ludilaj armiloj, laboriloj, kaj aŭtoj el plastiko. La ludmaterialo estis bona indikilo por la distribuo de la sociaj roloj.

Hotelo

Alija ĝustatempe alvenis, kaj ne povis malkaŝi sian kontenton pri la pasinta rendezuo kun tiu alloga amoristo: „Ja, tion mi hodiaŭ bezonis. Mi esperas, ke vi ankaŭ ĝuis viajn kontaktojn“. Birte kapjesis kaj esprimis sian dankon, kun iomete amara sono. Alija ne rimarkis tion kaj proponis: „Mi gvidos vin nun al via hotelo. Tie ni povos manĝi, kaj poste ni priparolu la venontajn planojn. Certe vi havas ankaŭ kelkajn demandojn“. Vere, ŝi pravis kun tiu rimarko.

„Alija, ĉu vi ofte bezonas tian distriĝon?“, demandis Birte. „Ne, ne, mi estas ja edziniĝinta“, respondis Alija, kaj Birte miris grandokule: „Vi havas edzon, ĉu vere? Ĉu li permesas tion?“ Nun Alija iomete ĉagrenite klarigis, ke edzo estas ja viro, kaj viron oni ja ne bezonus demandi pri permeso. Hieraŭ ne estis bona etoso en ŝia hejmo. Ŝia edzo estis tre laca kaj krome ne bone mastrumis. Li eĉ ne purigis la banejon. Li volis nur kuŝi sur sofo por spekti filmon. Ŝi ne sukcesis instigi lin por seksa

aktiveco. Normale estas ja la devo de la edzo bone kontentigi sian edzinon, kompreneble ankaŭ per sekso. Sed hieraŭ li fiaskis, tial ŝi kaptis la bonan ŝancon en la amuziĝstrato. Birte ne volis akcepti tion kaj daŭriĝis: „Kaj, se iam vi estus ne preta por sekso ago, ĉu via edzo tiam ankaŭ irus al alia virino?” Nun Alija montris sin ofendita: „Vi tute ne komprenas nian kulturon! Sur Umlaba ne eblas por edzo fari ion sen la permeso de lia edzino. Do, se mi ne konsentas kun la agoj de mia edzo, mi simple povus forpuŝi lin. Virinoj rajtas ĉiam postuli divorcon, viroj kompreneble ne rajtas“. Ŝi aldonis: „Tiuj leĝoj jam validas pli ol ducent jarojn. Tiuj leĝoj konservas la stabilan socialan sistemon sur Umlaba. Atentu, ĉi tie jam pli ol ducent jarojn regas paco!”

Don nun provis iomete ŝanĝi la temon. Li diplomatie rimarkigis: „Pardonu nin, ni venas ja de tute alia sistemo. Bonvole ne taksu niajn demandojn kiel kritikon. Ni ja venis ĉi tien por lerni, kaj mi ĝojus, se vi klarigos al ni viajn planojn por la venonta tago“. Alija anoncis gravan socialan kuneston en la urbodomo: „Morgaŭ venos multaj reprezentantinoj de la registaro kaj la ekonomio. Ankaŭ kelkaj famaj kantistinoj kaj aktorinoj venos, kaj vespere estos granda festo en la kela arkaĵo de la urbodomo. Tiam la etoso certe estus pli leĝera.“

Tre leĝere kondutis Birte, kiu kune kun Don okupis la hotelĉambron. Don ĵus komencis demeti sian mamzonon kun la silikonaj enmetaĵoj. Tiam Birte ege malrespekte tuŝis la postajon de Don kaj moke ĝemegis: „Estas tre bone vivi ĉi tie. Verŝajne mi restos sur tiu planedo. Tiam mi ja ĉiam povos domini miajn virajn kolegojn“. Kaj per tio ŝi denove mokis lin, ĉi-foje eĉ piĉante al li la pugon. „Tio estas seksperforto! Mi preparos denuncon ĉe la polico“, protestis Don, sed Birte kontraŭis: „Vi forgesis, ke ni estas sur Umlaba. Neniu helpus vin. Vi estas ja nur viro. Do, mi proponas, ke vi tuj petu pardonon. Pli bone estus, se vi leku miajn piedojn aŭ ...“. „Aŭ... ĉu vi vere postulas plian pardonpeton de mi?“ demandis Don, kiu nun bone kunludis kaj ridante brakumis ŝin. Estis la unua fojo, ke la du gekolegoj tiel intime proksimiĝis. Dum la tuta tempo de la tienveturado al Umlaba maksimume okazis 'familiara' tuŝo. Neniamekestis seksaj sentoj. Sed hodiaŭ ambaŭ rimarkis tion.

En tiu momento aŭdiĝis frapado je la pordo. En la koridoro staris du ĉambristoj. Birte iomete malfermis la pordon. „Ĉu vi bezonas ion? Ni volonte plenumos viajn plej ardajn dezirojn“ demandis unu el la junaj ĉambristoj. „Ne, ne, koran dankon“, respondis Birte kaj rapidege fermis la pordon. „Tio certe estis granda eraro. La du ĉambristoj verŝajne pli bone ol mi povus plenumi viajn ardajn dezirojn“, Don mokis ŝin. Birte ridetis, kaj ambaŭ sidiĝis sur la sofon por spekti filmon. Ne plu okazis amludado, ĉar ne estis facile subigi taboon.

Festo

„Helpu min!“, petis Don, ĉar li bezonis kosmetikan subtenon. Birte 'retuŝis' la plej gravajn konturojn sur la vizaĝo de Don. Li nun denove aspektis kiel virino. Tiu aspekto ja necesis por dece aperi je la venonta societa kunveno. Alija jam atendis en la hotela enirhalo kaj akompanis ilin al la veturilo. Antaŭ la urbodomo granda homamaso atendis por vidi la du astronautinojn de la fora planedo Tero. Birte kaj Don sentis sian kiel famajn 'kinostelojn' kaj klopodis montri kompleksajn vizaĝesprimojn. En la granda halo de la urbodomo Alija gvidis ilin al la honorlokoj en la unua vico antaŭ la podio. Preskaŭ ĉiuj aliaj seĝoj estis jam okupitaj. Sur la podio staris virina ĥoro, ĉiuj kantistinoj bele vestitaj.

Alija suriris la podion kaj stariĝis malantaŭ la katedro. Ŝi bonvenigis la kunvenintojn kaj anoncis la unuan prezentadon de la ĥoro. Sekvis la parolado de la urbestro, de la reĝina reprezentantino, de la ministrino por edukado kaj de multaj aliaj. Feliĉe, ke la voĉoj ne ĉiam tiel longe daŭris. Ĉiu esprimis grandan ĝojon pro la vizitantoj de la planedo Tero. Ĉiu formulis la esperon al bona kunlaboro en la estonteco. Kaj finfine ankaŭ Birte kaj 'Dona' devis prezenti sin. Kompreneble ili dankis pro la varma akcepto kaj - sekrete - esperis la baldaŭan finon de tiu aranĝo.

Sed la aranĝo pludaŭris. Sekvis muzika programo, kaj dancado kaj tiam, finfine, la paŭzo. Alija anoncis, ke post tiu paŭzo ĉiuj estus invitataj ĝui la festan bufedon. „Tio estas la plej bona parto de tiu aranĝo“, flustris Birte. Alija komprenoplene kaj ridete aldonis: „Havu paciencon! Post la bufedo sekvos ankoraŭ la 'leĝera aranĝo', la festo en la kelo de la urbodomo“. Ja, tion sciis ankaŭ Birte kaj 'Dona', sed nun ili devis iomete lukti por akiri la plej bongustajn manĝetojn. Denove estis paŭzo, kaj tiam sennombraj reporteraj aranĝis fotojn de la du teraninoj, kelkfoje sen, ofte kun aliaj gravulinoj. 'Dona' nur timis, ke sia virina masko ne bone aperus.

Ek al la leĝera parto de la festo! Ĉiuj kunvenintoj en la kela volbaĵo estis virinoj. Sed inter la homoj sur la podio ankaŭ troviĝis viroj. Ĉiuj aplaudis, kiam grupo el ses junaj, belaspektaj viroj aperis. Estis baleta prezentaĵo. La viroj portis specialajn vestaĵojn, tre strete aranĝitaj, preskaŭ travideblaj. Ĉiukaze, ne estis granda diferenco inter tiuj vestaĵoj kaj plena nudeco. Ŝajne la spektantaj virinoj ŝatis tian aspekton. La junaj virinoj, kiuj poste paradis kun sprita popmuzika kanto, portis tre decajn robojn. Okulfrape virinoj sur la scenejo preskaŭ ĉiam estis dece vestitaj dum viroj tre ofte aspektis tre malprudaj. Sed la spektantinoj evidente ŝatis tion. Ili ankaŭ ŝatis la spektaklan aranĝon en la mezo de la volbaĵo. Sur tri longaj brankardoj, kovritaj per alumina folio, surdorse kuŝis tri nudaj viroj. Pro multaj bruligaj torĉoj neniue povis ne rigardi tiujn brankardojn. La korpoj de la viroj es-

tis plejparte kaŝitaj pro multaj apetitaj manĝetoj. Troviĝis ĉiuj ajn manĝeblaj pecetoj kiel ekzemple fromaĝo, fruktoj, ĉokolado k.t.p. Subite alproksimiĝis amaso da avidaj virinoj. „Tio estas ja ege naŭziga aranĝo“, rimarkigis Birte kaj ankaŭ Don samopiniis. Tamen li atentigis sian koleginon, ke sur la Tero ankaŭ okazas similspecaj aranĝoj dum orgioj. Sed ili celas precipe al la amuzo de viroj, ĉar tie nudaj virinoj estis kovritaj per bongustaj manĝetoj. „Tion oni ankaŭ devas malpermesi“, opiniis Birte. Alija, kiu iomete kaptis tiun vortŝanĝon, diris: „Jen vi vidas, ankaŭ sur via planedo vi subpremas homojn. La diferenco ŝajne estas nur, ke vi subpremas virinojn! Ĉi tie ni sukcese ŝanĝis la aferon“.

Intertempe la avidaj virinoj formanĝis preskaŭ ĉiujn manĝetojn de la nudaj viroj, kiuj nun prezentiĝis tute sen kovraĵo sur la haŭto. Per laŭta muziko ili ekstarigis kaj dancis antaŭ la klaĉantaj virinoj. Tio ne estis la lasta sensaciaĵo de la festo. Ĉiuj okuloj subite direktiĝis denove al la podio. Tie nun staris dek kaĝoj, en kiuj estis enkaĝigitaj nudaj viroj. Ili povis etendi la brakojn tra la spacoj inter la kraderoj. Nun komenciĝis evidente konata seksa ludo. Dek nudaj virinoj saltis sur la podion kaj tuŝis la virojn per la manoj. Ne estis nur simpla tuŝado. Tre rapide ili kaptis la penisojn de la viroj kaj traktis ilin permane aŭ perbuŝe. Ne daŭris longa tempo, kaj tiuj virinoj estis starante fikataj per la enkaĝigitaj viroj. Denove aŭdiĝis laŭta muziko, kaj bruega aplaŭdo. La spektantaj virinoj kriis pro plezuro kaj laŭte postulis novajn kaĝojn kun 'freŝa vira materialo'. Trifoje la organizantoj liveris al ili 'freŝan provizon'. Don tre atenteme spektis la scenon. Li ŝatis la rigardon de tiuj multaj nudaj seksumantaj homoj, sed Birte ne eltenis tion kaj fuĝis al alia trankvila parto de la kela volbaĵo. Don kaj Alija akompanis ŝin. Alija ankaŭ rimarkis, ke tiu prezentaĵo ne bone plaĉis al Birte.

En la trankvila angulo troviĝis komfortaj seĝoj kaj eta tablo. Alija alportis malvarmajn trinkaĵojn kaj rimarkigis: „Estas bedaŭrinde, ke tiu festo ne povis plene kontentigi vin. Sed tio estas vaste ŝatata kutimo sur Umlaba“. Birte konstatis, ke la popolo de Umlaba evidente ne estas pruda kaj, ke ankaŭ sur la Tero estus similaj kunvenoj, aldonante, ke tiuj ne okazus sur la publika forumo. Tiam ŝi demandis: „Ni komprenis, ke ĉi tie virinoj tre facile seksumas kun fremdaj viroj. Ĉu ili uzas kontraŭkoncipilojn?“. Alija klarigis, ke sur Umlaba neniu bezonas tion. Don miris pri tio kaj aldonis: „Kaj, kio okazas, se estus koncipiĝo?“ „Sur la Tero vi certe ankaŭ ĝuis instruhorojn en biologio, do la sekvoj kompreneble povas esti gravedeco“ ridete respondis Alija kaj daŭrigis la paroladon: „Ni homoj sur Umlaba amas infanojn kaj ĉiam ĝojas, se iu virino gravediĝas. Ne gravas, kiu estas la patro. Tre ofte neniu sur Umlaba scias, kiu estas lia aŭ ŝia 'vera' patro, sed neniu interesiĝas pri tio. Viroj ĉi tie ja ne ludas altan rolon en la socio. Krome ĉiu edzo senprobleme akceptas bebĉon de sia edzino kaj zorgas pri ĝi kvazaŭ pri vere propra ido. Mi mem havas tri infanojn kaj ne scias, kiuj estas la biologiaj patroj de du el ili. Eventuale ankaŭ mia edzo generis idojn, kiu scias? Sed tio ja ne gravas.“

Ekskurso

La venontan tagon Alija akompanis la du teraninojn dum ekskurso. Birte kaj Don ĝojis pri tiu tago, kiu certe ofertus multajn teknikajn informojn, bona kontrasto al la distriĝoj de la pasintaj tagoj.

La unua celo estis la novkonstruita 'ETAV-elektrejo' (Elektrejo kun tubo por ascenda vento). La giganta turo estis jam videbla de malproksime. Ĝi estis ĉ. 1000 m alta kaj apogis sin al la kruta deklivo de la 'Kiŝa-monto', kiu troviĝis ĉe la orienta rando de la ĉefurbo. Malsupre situis granda duoncirkla spaco kun vitra tegmento. La principo estis facile komprenebla. Pro la varma suno eletendiĝas la aero sub la tegmento, flugas tra la tubo suben kaj movas la generatorojn en la tubo. Tiel ĝi produktas elektran energion, per tre malgrandaj kostoj. Alija tre fiere parolis pri tiu projekto, kiu iam eĉ estis realigata sur la planedo Tero. Sed tie oni konstruis nur malaltan turon, kaj la elektrejo funkciis nur kelkajn jarojn ĉar forta ventego detruis la turon. Sur Umlaba oni plibonigis la konstruaĵon, kaj la turo estas subtenata per monto-deklivo.

La dua celo estis instituto, en kiu oni esploris la biologian 'transmutacion'. Tiun fenomenon la sciencistoj longe taksis neebla. Ili pensis, ke nur ĉarlatanoj raportis pri tio. Sed la esploroj sur Umlaba pruvis la efikon. Vivantaj organismoj kapablas ŝanĝi la atomkernojn. Do, ili povas ŝanĝi kemiajn elementojn sen uzi altajn temperaturojn. La esploroj sur Umlaba ne finiĝis, sed la aktualaj rezultoj estis jam promesplenaj.

Je la vespero ili vizitis la grandan universitaton en la ĉefurbo. Alija organizis kunvenon kun profesoro pri neŭroscienco, kiu prezentis la plej novan aparaton por stori la enhavon de la homa memoro: „Ĝis nun ni nur sukcesis savi la mallongdaŭran memoron, sed tiu estis jam sensacio. La celo estas, kompreneble, konservi la longdaŭran. Mi konfesas, ke Umlaba jam delonge profitas de la informoj, kiujn ni ricevas de via planedo. Estas bedaŭrinde, ke ĝis nun neniu realigis revenan fluon de la informoj al la Tero. Tial mi proponas, ke dum via longdaŭra reveturo vi nepre kunprenu memorigilon kun sufiĉe granda kolektaĵo de teknikaj informoj de nia planedo. Koran dankon pro via vizito, ĝuu la vespermanĝon en nia universitata kantino“.

Konspiro

Estis bona vespermanĝo. Nun post la ekskurso ĉiu malsatis kaj bezonis ripozon. Alija jam frue adiaŭis, ĉar hodiaŭ ŝi devis helpi sian edzon pro la infanoj. Ŝi rekomendis al Birte kaj Don iomete resti en la kantino. La veturilo venus post ĉ. unu horo kaj tiam portus ilin al la hotelo.

„Ĉu estas loko?“, demandis juna virino, kiu ankaŭ volis mendi vespermanĝon. Birte respondis: „Jes, sidiĝu. Ni ja jam finis nian manĝadon kaj nur restas ĉi tie por babilado. Ĉu tio ĝenas vin?“ La junulino replikis: „Ne, tute ne, de kie vi venas? Vi aspektas iomete fremdaj. Cetere, mi nomiĝas Tamika, studentino de neŭrosciencoj“. Birte klarigis al ŝi, ke ili venis de la planedo Tero kaj nun ekskursas sur Umlaba. Ŝi ankaŭ rakontis pri la pasintaj tagoj, kiuj unue estis plenigitaj per la distriĝa programo. „Jes, estas kutimo ĉi tie, unue montri al novaj gastoj la eblecojn por amuziĝo“, rimarkgis Tamika kaj aldonis: „Tiam vi ja lernis multon pri nia kulturo, ĉu ne?“ Don konstatis tion kaj malkaŝe menciis: „Jes, ni lernis multon, kaj ni komprenis, ke viroj ne vivas egalrajte sur Umlaba“. „Vi pravas, mi vere hontas pro tio“, diris Tamika, „sed parolu ne tiom laŭte. La subpremo de la viroj apartenas al nia sistemo, kaj ĉiu kritiko estas ankaŭ subpremata.“ Tiam ŝi rakontis, ke ŝi estis membro de aktiva studenta grupo, kiu sekrete engaĝiĝas por la egalaj rajtoj kaj elpetegis: „Bonvole tian sekrete, mi ne volas ekhavi problemojn“. Don diris „Kompreneble, ni estas ja nur gastoj, ni ne volas krei problemojn. Ankaŭ vi bonvole ne parolu kun aliaj pri nia opinio“.

„Ĉu vi jam akiris sukcesojn?“, demandis Birte, kaj Tamika fiere raportis pri la plej aktualaj plibonigoj por viroj, kiujn ŝia grupo atingis: „Je ĉiu laborloko estas nun homo, kiu akceptas la plendojn de la viroj. Li aŭ ŝi helpas, se iu ĉefino kontraŭleĝe agas, ekz. misuzas lin. La problemoj nur estas, ke seksa ekspluato preskaŭ neniam estas pruvita. La dua sukceso venos verŝajne la venontan jaron. Niaj advokatoj venkis en tribunalo. Baldaŭ ankaŭ viroj rajtos havi propran ĝirokonton. Alia eta sukceso estas, ke nun ekzistas apartaj parkejoj nur por viroj. La ĝistempa kutimo estis, ke ĉiu libera loko sur parkejo estis unue rezervita por virinoj. Sed tiu ja nur estas vere eta afero“. Birte dankis por la klarigoj kaj adiaŭis: „Ni ĝojas, ke ni trovis iun, kiu pensas kiel ni. Al via studenta grupo ni deziras bonan sukceson. Sed nun ni devas iri al la veturilo. Kontakti nin en la hotelo, se eblas. Ĝis!“

Bazoŝipo

En la enirhalo de la hotelo jam atendis ilin Alija, kiu venis por paroli pri la venonta tago. Ŝi ricevis interesan novaĵon de la reĝino. Princino Alara ŝatus viziti la bazoŝipon. „Kial ne, tio estas tre bona ideo“, opiniis Don kaj tuj kontaktis sian kapitanon, kiu ankaŭ tre ĝojis pri tiu peto. Alija aranĝis la flugon per la pramo al la bazoŝipo por la princino, akompanita de Alija kaj Don. Birte restis sur Umlaba, ŝi planis mem iri al la universitata kantino por denove konversacii kun Tamika.

„Bonvenon, estimata princino“, salutis Kapitano Roman Fjodorov kaj gvidis la princinon al la tre komforta ĉefa seĝo, kaj ŝerco demandis: „Ĉu vi ŝatus partopreni nian teamon? Vi certe estus tre bona stiristino por nia bazoŝipo“. La princino komprenis la ŝercon kaj respondis: „Estu singardema, kapitano. Kion vi farus, se mi vere akceptus vian proponon? Sed unue montru al mi vian kosmoŝipon. Mi ja ĝis nun neniam vidis tian modernan veturilon.“ Roman galante subtenis ŝin forlasi la seĝon kaj ĝentile ofertis sian brakon al ŝi. La princino miris pro tio, sur Umlaba la viroj ja ne tiel sintenas. Ŝi volonte kaptis la brakon kaj lasis sin gvidi tra la koridoroj de la kosmoŝipo. Alija kaj Don sekvis en konvena distanco.

Roman montris ĉiun angulon de sia 'regno'. Li eĉ demonstris la dormkabinojn: „Estas iomete malvasta spaco, sed tre komforta. Ĉu vi ŝatus elprovi la 'kosman liton', tajlorita laŭ mezuro de princino? Certe ĝi plaĉus al vi“. Princino Alara akceptis tiun oferton kaj kuŝiĝis en la dormkabinon. Ŝi vere ĝuis la gvidadon de la kapitano kaj dankis pro lia ĝentileco. „Ne dankinde, kara princino. Sed, permesu, ke mi ŝercu iomete. Mi nur bedaŭras, ke mi ne samtempe kun vi kuŝiĝas en tiu kabino“. Alija tuŝegis Don sur la dorso kaj flustris: „Via kapitano ja amindumas! Mi nur miras, ke la princino toleras tion“. Don tuj komprenis tiun indikon kaj vokis: „Kapitano, mi forgesis montri al Alija nian modernan komputilon. Ĉu vi permesas, ke mi iru kun ŝi al la pilotejo?“ Kompreneble Roman permesis tion, kaj nun daŭrigis la gvidadon de sia alta gastino.

Alvenante la privatajn areojn li invitis ŝin eniri la 'kajuton' de la kapitano kaj diris: „Prenu lokon. Kian trinkaĵon vi ŝatus trinki?“ Princino Alara sidiĝis apud plata tablo, kaj Roman elprenis du tasojn el la aŭtomato. „Dankon pro la kafo“, replikis Alara kaj demandis: „Kion vi pensas pri nia planedo Umlaba?“ Roman klarigis al ŝi, ke li nur tre mallonge estis sur la planedo. Li ankaŭ rakontis, ke la reĝino ne volis paroli kun li, ĉar sur Umlaba la viroj ĉiam devas resti je malalta rango. Tial lia kolego Don eĉ ŝanĝis sian aspekton. Du kosmetikistinoj traktis lian vizaĝon tiele, ke li nun aspektas kiel virino. Nur tial li rajtis esplori la planedon Umlaba. „Tio estas ja terure. Tion mi ne sciis“, kun tiuj vortoj princino Alara esprimis sian bedaŭron aldonante: „Mi tuj ordonas al vi, ke via kolego Don senmaskiĝu. Poste ni ĉiuj flugos per la pramo malsupren, kaj mi akompanos vin al nia palaco. Tie mi klarigos la aferon kun mia reĝina patrino. Ne timu, ŝi devas ŝanĝi sian opinion.“

Reĝina palaco

El la reĝina salono aŭdiĝis laŭtaj voĉoj. Princino Alara riproĉe admonis sian patrinon pro la terura decido, rifuzi la konversacion kun kapitano Fjodorov. „Ni ne plu vivas en la mezepoko. Fjodorov estas ĉi tie la reprezentanto de la tuta planedo Tero. Mi postulas, ke vi tuj petu pardonon pro via eraro“. Reĝino Tale Baleva neniam antaŭe estis vidanta sian filinon tiel furioze kaj provis trankviligi ŝin: „Mia filino, mi ja nur klopodis protekti niajn morojn. Mi faris tion ankaŭ por vi. Ankaŭ mi ne sentis min bone, sed mi ne sciis kiamaniere nuligi mian ordonon“. Do, Princino Alara venkis, kaj ŝia patrino, la reĝino de Umlaba, akceptis la du virojn el la fora planedo Tero per la vortoj: „Estimata kapitano, mi pardonpetas pro mia eraro. Dankon al mia filino Alara. Ŝi malfermis miajn okulojn. Estu bonvenaj. Mi esperas, ke tiu epizodo ne difektos la rilatojn inter niaj popoloj. Por montri al vi mian konfidon, vi tuj ricevas viajn armilojn. Sed certe vi ĉi tie ne bezonos ilin“. Roman kaj Don riverencis, kaj la reĝino forlasis sian tronon kaj etendis sian dekstran manon. Ankaŭ la princino venis. Ŝi longe premis la manon de Roman kaj tre kontentige ridetis.

„Kara patrino“, demandis Alara, „ĉu vi nun permesas, ke mi montru al niaj gastoj nian palacon? Kapitano Fjodorov ja ankaŭ gvidis min tra sia kosmoŝipo“. La reĝino akceptis ankaŭ tion kaj invitis la gastojn poste partopreni vespermanĝon en la oranĝerio. „Ho ve, ni forgesis nian koleginon Birte. Mi petas, ke ŝi ankaŭ partoprenu la vespermanĝon“, diris Roman, kaj la princino tuj venigis servistinojn iri al la universitata kantino por kontakti ŝin.

Intertempe Alara komencis gvidi la gastojn tra la palaco. Alija kaj Don denove sekvis en adekvata, nun pli granda distanco. Evidentiĝis, ke Alara ĝuis la ĉeeston de la kapitano. Ŝi prenis lian brakon, kaj ambaŭ iris antaŭe tra la vasta konstruaĵo. Roman fiere paŝis apud ŝi, li jam sentis sin kiel princon. De tempo al tempo li turnis sian kapon al ŝi por havi pli bonan rigardon al ŝia vizaĝo. Alara rimarkis tion kaj reagis per ĉarma ridetado. Dum tiu promenado ambaŭ ne vere interesiĝis pri la vidindaĵoj de la palaco. Ili nur pensis pri bona ŝanco kunesti sen aliaj homoj. Je la fino de longa koridoro malfermita pordo gvidis la promenantojn al la reĝina ĝardeno. Tie troviĝis multaj buntaj florbudoj, kaj ankaŭ altaj heĝoj apud ordemaj padoj. Ne daŭris longe. Alara kaj Roman sole sidiĝis sur komfortan benkon, ŝirmatan de granda arbo kaj du altaj heĝoj.

„Ĉu vi ŝatus fari malgrandan vojaĝon al la maro?“, demandis Alara. Roman senhezite kaptis la ŝancon, alproksimiĝis al ŝi kaj respondis: „Sed nur kun vi, sen akompano de iuj servistinoj“. Princino Alara ne rifuzis lin. Ŝi eĉ ŝovis sian korpon pli proksimen kaj tuŝis lian vangon kun sia dekstra mano. „Ne estas eliro“, pensis Roman, brakumis ŝin kaj premis siajn lipojn sur ŝian buŝon. Neniu nun ĝenu la ĝermantan amon. Bedaŭrinde tio ne eblis en reĝina ĝardeno. Aŭdiĝis la voĉoj de Alija kaj Don, kiuj longe promenis tra la tuta ĝardeno por eviti renkontiĝon kun la princino kaj la kapitano. Sed nun ili devis reiri al la palaco por la vespermanĝo kaj vole-nevole uzis la padon, kiu ĵus gvidis al la benko kun la amanta paro. „Rapidegu, estas tempo por la vespermanĝo en la oranĝerio“, vokis Alija jam defore.

La eleganta ronda tablo en la oranĝerio portis la plej multekostajn telerojn kaj manĝilarojn. Servistinoj gvidis la gastojn al iliaj seĝoj, kaj ĉiuj atenteme direktis la okulojn al la reĝino. Ŝi kaptis glason kun ŝaŭmvino kaj tostis al la amikeco inter Umlaba kaj la Tero. Ĉiu aplaudis kaj poste ĝuis la bongustajn manĝaĵojn. Princino Alara, sidante apud kapitano Fjodorov, gaje konversaciis kun li, sed intertempe ofte rigardis ŝian patrinon atendante la ĝustan momenton por la plej grava demando. Ĉu la reĝino konsentus, se ŝi sole kun la kapitano vojaĝus al la maro?

Vojaĝo

La reĝa patrino kompreneble ne permesis vojaĝon sen akompanantoj. Birte kaj Don devis kunvojaĝi. Per la reĝina helikoptero ili flugis al malgranda insulo, sur kiu la reĝino ofte mem feris en somero. Krome alia helikoptero kun kvar soldatinoj akompanis ilin por sekurigi la ekskurson. Sur la insulo troviĝis du konstruaĵoj. Unu eta domo, pli bone dirite eleganta laŭbo, estis por la princino kaj la akompanantoj. La alia konstruaĵo estis malgranda lumturo je alia flanko de la insulo. Tie estis loĝloko por la soldatinoj.

„Mi sentas disreviĝon“, plendis Alara kaj aldonis: „La laŭbo vere ne estas granda. Mia reĝina patrino bone antaŭzorgis, ke mi estu bone prigradata“. Don ridete replikis: „Mi pensas, ke via patrino tre saĝe agis. Nur tiamaniere mi havas la ŝancon kontroli mian kapitanon. Preskaŭ la tutan tienvojaĝon li ĝuis la vintran dormon en la kosmoŝipa kabino. Mi tial neniam sciis ion pri liaj celoj. Sed nun mi proponas naĝi en la varma oceano. Ĉu vi kunvenas, Birte?“ „Jes, faru tion, ni poste raportos al vi, kion ni faris dum via foresto“, vokis Roman, kaj princino Alara estis tre kontenta pro la ĝentileco de la du akompanantoj.

„Ĉu estas vero, ke vi jam estas pli ol 75-jaraĝa, Roman?“, demandis Alara, kiu ĵus festis sian 22-an naskiĝdatrevenon. Roman nur povis konfirmi tiun indikon, ĉar li ja kvindek jarojn restadis dum vintra dormo en la kosmoŝipa kabino. „Sed pripensu tion, se vi akompanus min al la reveturo mi

atingos eĉ pli ol 125 jarojn, kaj vi tiam estus 77-jaraĝa. Ĉu vere bona aĝo por kreskigi niajn infanojn", li serĉe aldonis, kaj Alara tre ĝojis pro tiu aludo. „Ĉu vi jam post tiel mallonga tempo certas, ke vi povus esti la ĝusta viro por mi?", ŝi demandis. „Kompreneble, tial mi ja akompanas vin dum tiu vojaĝo", li replikis, sed Alara ankoraŭ ne estis tute konvinkita kaj proponis: „Mi nun ne povas tiel rapide decidi. Unue vi devas pruvi, ke vi estas la ĝusta!"

Roman komprenis tion kaj decidis tujan atakon. Li brakumis kaj kisis ŝin sen antaŭa demando. Alara ne estis atendinta tion, sed ŝi ne rifuzis lin. Singardeme ŝi direktis siajn okulojn eksteren por certigi, ke Birte kaj Don ne tro frue alvenus. Sed Roman trankviligis ŝin: „Ili jam registris, ke mi amas vin, do tion oni ne povas plu kaŝi. Krome ili estas miaj gekolegoj kaj geamikoj, ili ne ĝenas min." Kaj per tiuj vortoj li daŭrigis la kisdadon kaj karesadon, bona komenco por tri liberaj tagoj sur bela insulo.

„Ni revenis", vokis Birte defore por averti la principon kaj la kapitanon. „Jen estas freŝa mantuko. Kial vi ne ankaŭ iras al la plaĝo?", li demandis, kaj Roman respondis: „Jes, ja, vi ja nur volas esti sen akompanantaro, ni ja tuj foriras", kaj tiam li kaptis la brakon de Alara kaj kuris kun ŝi al la strando. Anhelante ili lasis sin fali sur la blankan sablon. Denove daŭriĝis la karesado. La suno donis agrablan varmecon, kaj Roman sentis nun la emon por naĝi. „Ni ja tute forgesis niajn bankostumojn", rimarkigis Alara, sed tio ne kaŭzis problemon. Li senhezite senvestigis sin. Ankaŭ Alara faris tion, kaj ambaŭ sin ĵetis en la bluan, klaran akvon. Malsekaj ili revenis kaj dense kuŝiĝis sur la mantukon. Denove la suno donis bonan influon. Pro varmecon Roman baldaŭ ŝanĝis sian pozicion, kaj tial li tuŝis la dorson de Alara kun sia intertempe erektiĝinta penis. Estas feliĉo, ke tio ankoraŭ funkcias, post la longa vintrodormo, li pensis, kaj ĝuis la tuŝon. Ankaŭ Alara ŝatis tion, turniĝis kaj ekkaresis la rigidan faluson. „Neniu vidas nin. La soldatinoj de la lumturo estas je la alia flanko de la insulo", ŝi flustris, kaj Roman enŝovis sian viraĵon en la principan piĉon.

Dume en la eleganta laŭbo evoluiĝis la konkuranta amludado. „Nun ni havas tempon", diris Don kaj daŭrigis froti la korpon de Birte per la mantuko. „Tempon por kio? Mi ne komprenas!" replikis Birte, sed Don ne respondis. Li nur brakumis ŝin, kaj nun ŝi komprenis ĉion. Sekvis longa langokiso dum kiu Birte karesis la tutan nudan korpon de Don. La bela insulo estis ĝusta loko por amantaj paroj.

Adiaŭo

Tro rapide forflugis la tri liberaj tagoj. La helikoptero senprobleme kaj sekure transportis ilin revene al la palaco. Gravmiene bonvenigis la reĝino sian filinon. Ŝi jam antaŭsciis la minacantajn problemojn. Ĉu la 'virina regno' pludaŭros sur Umlaba? Ĉu ŝia filino vere elektus la kapitanon kiel edzon? Ĉu ŝi planus vojaĝi kun li al la planedo Tero? Aŭ ĉu la kapitano restos ĉi tie sur Umlaba? Tiam Birte kaj Don devus sole veturi hejmen. Sed eventuale oni trovus ja novan aspiranton, aŭ du, kiuj povus akompani ambaŭ. Ĉiukaze, la venontaj tagoj alportus malfacilan decidon. Kiu devus diri 'Adiaŭ' ?

> > > F I N O < < <